

InKo



N-ro 79
Nov/Dec 2014

Doktoro Braz, ni sukcesis!

SPECIALE:
99a Universala
Kongreso de
Esperanto

LA GIGANTO VEKIĜIS!

KKE revenas al la
eldona merkato pere de
libro verkita de unu el
siaj plej brilaj gefiloj

ESPERANTO ILUSTRITA
Nova programo metas ĝin
en portebajn aparatojn





4

KOVRILE
LA GIGANTO VEKIĜIS
 KKE revenas al la eldona merkato



12

INFORMADIKO
 Esperanto Ilustrita lanĉis aplikan programon por porteblaj aparatoj



6

SPECIALE
**Ne tiom granda...
 Sed altnivela**



9

SPORTO
**Futbalo por
 Esperanto en Afriko**



14

FORPASOJ
**Franca esperantistino
 pereis en aviadila
 akcidento**

Rubrikoj

3

Vidpunkto

8

Eldiro

11

Junularo

13

Libro-ŝranko

15

Radaro



**Esperantlingva Revuo
 de Kultura Kooperativo
 de Esperantistoj**

Eldono n-ro 79

Nov-Dec/2014

Kunordigado Givanildo Ramos Costa
Redaktado/Editorado Fabiano Henrique
Revizio Revizio-komisiono
Kunlaborantoj Jair Salles, G. Costa, F. Henrique, Leandro Silvestre kaj F. Pita
Cirkulado dumonata

Kultura Kooperativo de Esperantistoj
Adreso Avenida Treze de Maio, 47 - sl. 208
 Centro – Rio de Janeiro – BR 20031-921
Telefono 55 21 2220-7486 kaj/aŭ 55 21 2544-4314
Rete www.kke.org.br
Redakcio inko.kke@hotmail.com



El la Redakcio

Fabiano Henrique

Jen la nova numero de *InKo*!

Ĉiam, je la fino de la jaroj, ni retrorigardas kaj analizas niajn agojn. Ĉi-foje ni povas konstati, ke nia laboro, kvankam tro peza, donis al ni la certecon, ke ni estas sur la ĝusta vojo.

InKo trapasis la unuajn barojn, kaj sin preparas por venki novajn defiojn. Tial, okaze de tiu ĉi numero, ni estigis novajn sekciojn.

La ĉefa el ili estas *Informadiko*, kiu celas pri-trakti tiufakajn nunajn atingojn rilate al Esperanto en lingvaĵo klara por ĉiuj.

Pro ĉio tio ĉi ni deziras al vi bonan legadon!

Rimarko: *Recenzotajn librojn aŭ aŭdvidajn materialojn oni alsendu po du ekzempleroj al la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. La ricevo de tiaj korespondaĵoj tute ne devigas la institucion publikigi favorajn opiniojn pri ili.*



IMITENDA HUMANA ESTULO

Ĉ

iam, kiam mi havas oportunan momenton por profundkore laŭdi kaj agnoski la geniecon de Zamenhof, mi ne perdas tempon.

La pola homara amiko estis tiel speciala, ke li, pro sia bonega sinteno rilate al la malbonaĵoj de multaj nunaj homoj, povus roli kiel modelo. Pro siaj efektivaj faroj, li ludus tian rolon precipe por eminentuloj, kiel politikistoj, prezidentoj, regnestroj, diverskampaj aŭtoritatuloj, patrolandaj reprezentantoj ĉe UN kaj eĉ gravaj religiuloj.

Li, kiel simpla okulkuracisto, faris multe pli ol pluraj famaj kaj renomaj homoj laŭlonge de la Historio. Havante sian konsultojn en la hebrea kvartalo de Varsovio, kiom da malriĉaj klientoj li helpis!

La karmemora svisa samideano Edmond Privat, elstara ĉiama batalanto de nia movado, parolis pri tio en la libro *Vivo de Zamenhof*. La kreinto de Esperanto plurfoje evitis la blindiĝon de multaj malriĉaj laboristoj, kiuj estis liaj klientoj. Plie: li cetere ĉiam helpis kaj fratece subtenis ilin morale.

Bone taksante tion, nome liajn tre modestan vivmanieron kaj profundan amsenton je la homaro, venas en mian kapon la jena demando: ĉu Zamenhof ne

servus kiel imitinda modelo por multaj nuntempaj gravuloj, kiuj – tra la *tuta* mondo – nur donadas maldecajn ekzemplajn?

Imagu ankaŭ se tiaj homoj – kaj granda parto de la loĝantoj de la terĝlobo – konsiderus kaj definitive alprenus Esperanton, kiu estas unu el la ĉefaj lastatempaj inventaĵoj, kaj kiu precipe celas la plibonigon de la vivkondiĉoj de la homaro! Kiom da avantaĝoj moralaj kaj unuigaj ni havus!

Do, surbaze de tio, Majstro Zamenhof, ni gratulegas vin pro via kuraĝo lasi ĉe ni tiun

gravegan instrumenton por nia perfektigo kaj vivplibonigado surtere!

La restarigo de la Eldona Fako de KKE

Ni de KKE, treege senteme kaj rekonante vian komunikliberigilon, nome la Internacian Lingvon, revenas al la eldonado de libroj, gazetoj, diskoj kaj plurspecaj esperantaĵoj, karega Zamenhof! Substrekendas, ke tion ni faras omaĝe al vi!

Nia Eldona Fako, kiu estis iom senaktiva dum kelkaj jaroj, revigliĝas pere de la publikigo de la libro *Saluton, Samideano!*, elpensita de nia karega kunulo Aloísio Sartorato. Nia eldonejo, kiu iam estis unu el la plej gravaj en la tutmonda esperantista movado, nun refunkcias kaj firme irigas nin antaŭen.

Dankon, amata Zamenhof, pro ĉio! ★

“Ĉiam, kiam mi havas oportunan momenton por profundkore laŭdi kaj agnoski la geniecon de Zamenhof, mi ne perdas tempon.”

Kelkfoje vivo donas al ni oportunojn, kiuj markas nian surteran vojiron. Ili estas kvazaŭ donacoj al ni oferitaj de la “potenca senkorpa mistero, fortego, la mondon reganta”. Do ni ĝojas rigardi la historion esti verkita antaŭ niaj okuloj. Kvankam nur pli poste ni rimarkas la veran gravecon de tio, kion ni ĵus spektis, ni povas nun iel ĝui la plezuron kunlabori je la verkado de la vivo-libro.

Antaŭ nelonge mi travivis tian momenton. Pli ol tio: mi iom helpis per malgranda briko – ja tre humila – la verkadon de la historio de Esperanto. Tio, per si mem, fierigas min, kaj restigas ĉe mia koro senton de plenumita devo.

La nokto de la 14a de Marto estis neforgesebla. Du gigantoj vekiĝis kaj ekpaŝis. Komence iom stumble. Sed poste ili reakiris konfidon, tuj firme promenante, kvazaŭ tiu, kiu reokupas sian ĝustan lokon en la vivo-konzerto kaj konscias sian valoron.

Unu vorto povas difini la spektaklon, kiun mi ĉeestis: *superado*. Superado de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kiu ne mezuris klopojn por reaktivigi sian eldonejon, malgraŭ la grandaj malfaciloj, kiujn ĝi alfrontas. Superado de la verkisto Aloísio Sartorato, kiu trapasis delikatajn sanproblemojn, kaj lasis elflui tion, je kio lia koro estas ja plena: amon al Esperanto.

Proksimume du dekoj da personoj venis al la sidejo de KKE spekti la lanĉon de la libro *Saluton, samideano!*, verkita de Sartorato mem. La prezidanto de tiu institucio, la radioparolisto Givanildo Costa, estris la solenaĵon. Kortuŝite, li parolis pri la graveco de tiu verko, kiu enhavas tekstojn elpensitajn laŭlonge de pli ol duonjarcento da Esperantaj travivaĵoj.

Poste koncernis min la honoro esti

LA GIGANTO VEKIĜIS!

Kultura Kooperativo de Esperantistoj revenas al la eldona merkato pere de libro verkita de unu el siaj plej brilaj gefiloj

invitita antaŭ la mikrofonon pritaksi la restarigon de la eldonejo de KKE, unu el la plej gravaj en la historio de la Internacia Lingvo. Mi uzis la okazon por memori la ĉeestantojn, ke *Saluton, samideano!* estis la unua elektronika libro originale verkita en esperanto en Brazilo. Mian alparolon mi finis montrante la revuon *Inko* kaj diskojn antaŭ nelonge eldonitajn de nia Kooperativo. Tio ja nekontesteble pruvis, ke “la giganto vekigis”.

Sinsekvis aro da emociaj alparoloj. Amarilio Carvalho, samtempulo de la fondo de KKE, parolis pri sia amika rilato kun Sartorato, kiun li enkondukis en la Esperantomondon. Neide Barros Rêgo, la mecenato de la

publikigo de tiu libro, emfazis la plensignifan delikatecon de la kovrilfoto. Krome ŝi donacis al la verkisto priesperantan ĉemizon. La instruisto Jair Salles gratulis Sartoraton, substrekante la kunlaboron de ambaŭ por la estigo de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo).

Aloísio Sartorato ankoraŭ unu fojojn prenis la mikrofonon. Tiam li faris improvizitan prelegeton, dum kiu defilis aro da nomoj kaj faktoj, el kiuj konsistas la historio de la Esperanta movado brazila kaj eksterlanda. Kun la libro ĉemane, li regalis la publikon per sia simpla, bela kaj flua parolo.

Je la fino, Neide Rêgo deklamis poeziaĵojn subskri-

bitajn de Sartorato. La juna Allan Argolo legis recenzon pri *Saluton, samideano!*, verkitan de Paulo Sergio Viana, eldonitan en la revuo *Rio Esperantista*. Post tio havis lokon aŭtografita sesio.

Mi ne povas ne gratuli la prezidanton Givanildo Costa, kiu faradas grandajn klopodojn – vere grandajn – cele la pligrandigon de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Same necese estas danki la poetinon Neide Barros Rêgo, kiu aliĝis kaj helpis tiun ĉi projekton.

Elirante el la sidejo de KKE, mi haltis ĉe la fotografio de la kunfondintoj de tiu institucio. Kaj ne retenante la larmojn, mi, plene je emocio, diris: “*Doktoro Braz* (fondinto de KKE), *ni sukcesis!*” ★



Foto-albumo



Givanildo Costa kaj A. Sartorato



Neide Barros Rêgo, Aloísio Sartorato kaj Walmir Ventura Rêgo

Ne tiom granda... Sed altnivela

La 99a UK estis la plej malgranda ekde la jaro 1920a, em Hago (Nederlando). Tamen la nivelo de la programo plaĉis la partoprenantojn.

Fabiano Henrique

De la 26a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto, Bonae-ro gastigis la pintan eventon de la esperantista kalendaro, la Universalan Kongreson de Esperanto. Je la 99a fojo ĝi okazis, sed ĉi-jare la nombro da aliĝintoj surprizis pro sia malgrande-co. Ekde la jaro 1920a tiaj aranĝoj ne logis tiom malmulte da kongresanoj. Estis entute 659 personoj, venintaj el 56 landoj.

La prezidanto de UEA, Mark Fettes, ne taksis tiun kongreson malgranda, sed *intima*. Eble tiu eŭfemismo povas ŝajni neĝusta, sed ĝi ja respogas la ĝeneralan opinion de la kongresanoj.

Laŭ la kvalito de la programo, la 99a UK bone impresis. Kvankam kelkaj eminentuloj ne povis partopreni, la ĉi-fojaj prelegantoj ludis bone siajn respektivajn rolojn. Krome la elekto de la temoj estis trafa kaj iel agorde kun la loka kulturo.

Ekzemple citindas la okazigo de la unua futbala matĉo kadre de UK-oj. La 31an de Julio, Esperanta selektitaro alfrontis argentinan teamon. La fina rezulto estis antaŭvidebla: la loka skipo venkis je 8 x 3 la verdĉemizan. Tamen tiukaze pli gravas la eksterordinareco de la programe-ro mem.

Je tiu ĉi kongreso ne havis lokon multe da lanĉoj de libroj kaj diskoj. Citindas nur la nova KD de Manŭel, *Dan-*

kas mi la vivon. Krome, KKE enigis sian plej novan titolon, nome *Saluton, samideano!*, verkitan de Alóisio Sartorato, en la libroservon de UEA.

La arta programo estis bunta kaj alloga. Amarilio Carvalho sukcese surscenigis la monolongon *Joaquim José, Fidoplena Martiro*, pri la brazila nacia heroo Tiradentes. Koncertis Supernova kaj Manŭel en la instalaĵoj de la teatro *Metropolitan Citi*. Du tagojn poste la artistoj, kiuj sin prezentis dum la arta vespero, kortuŝis la spektantojn. Neide Barros Rêgo kantis la kanzonon *Ne ploru pri mi, Argentino*, esperantigitan de la instruisto Jair Salles, ano de KKE. Alia membro de tiu sama institucio, Tânia Paixão, amuzis la ĉeestantojn per la imitado de Charlie Chaplin.

Eble la ĉefa trajto de tiu ĉi UK estis igi UEA-n pli proksima de la hispanlingva Ameriko. Loĝantoj de tiu kontinento foje plendas (*ne malprave*) pri la troa Eŭropeco de la movado. Ĉi-foje al la kongreso venis homoj el pluraj Latin-Amerikaj landoj, kiuj pro malfavoraj financaj kondiĉoj kutime ne povas vojaĝi al Eŭropo kaj Azio. ★

La opinio de Osmo Buller



La ĝenerala direktoro de UEA parolis al Radio Rio de Janeiro

“Mi havas tre pozitivan impreson pri tiu ĉi UK. Ĝi eĉ superis miajn atendojn. Mi iomete timis, ke povus esti multaj organizaĵaj problemoj, ĉar preskaŭ neniu el la membroj de la LKK havis sperton pri UK-oj. Sed tute ne okazis tiel. Dum la tuta kongresa semajno regis tre bona etoso, ankaŭ pro tio, ke estis sufiĉe multe da junaj kongresanoj, kiuj kreis bildon pri juneca movado. Mi kredas, ke tiu ĉi kongreso estas nova, bona kaj forta impulso por nia movado en Argentino. Ĝi certe donas kuraĝon al la argentina movado en la estonteco. Do, entute, kiun ajn aspekton de la kongreso mi pensas, mi venas al tre pozitivaj konkludoj.”

Foto-raporto

La libro *Saluton, samideano!*, eldonita de KKE, en la libro-servo de UEA.



La prezidanto de UEA, Mark Fettes, dum la Strategia Forumo.



Amarílio Carvalho



La impona kongresejo. Rimarku la Esperantan flagon ĉe la fasado.



Estrara kunsido de UEA



José Antonio Vergara intervjuata.



Ĉiuj venkis en la historia matĉo.



Osmo Büller dum la aŭkcio.



Neide Barros Rêgo emociis la spektantojn dum la arta vespero.



Tânia Paixão vekis ĉies atenton



Gratulon al KKE – kaj ties tuta estraro – pro ĝia reveno al la eldona merkato. Mi elkore deziras, ke tiufake la estonto de KKE estu plena je gloro kaj sukceso, same kiel antaŭe!

Marly Freitas
(Rio-de-Janeiro)

Unue, mi volas gratuli vin, eldonan skipon, pro la mirinda eldono de *InKo* n-ro 78.

Mi havis iom da tempo por tralegi ĝin kaj rimarkis la altkvalitajn tekstojn, kiujn ĝi entenas. Aparte, mi volas reliefigi la mirindan artikolon, kiun Givanildo skribis pri la interna ideo de Esperanto kaj pri siaj rezonoj rilate al signifo de Esperanto sen tiu speciala sento. Ni devas reliefigi, kiel eble plej multe, ke la apero de Esperanto havas plej puran signifon kadre de la granda interpreto de Zamenhof pri homarismo, kiu estas funde ligita al la interna ideo de nia komunumo. Tio emfazas la socian situacion de Esperanto: Homarama idearo kun neŭtrala lingvo, ne la kontraŭo.

Mi ankaŭ ŝategis la artikolon de Jair Salles, nia granda majstro en Brazila Movado. Lia teksto pri Subjunktivo (Konjunktivo) estas surprize altnivela kaj portas grandan analizon kiu

estas tre utila al tradukistoj kaj verkistoj en la internacia lingvo.

La recenzo farita de Fernando Pita pri la tradukaĵoj de Machado de Assis, faritaj de Paulo Sérgio Viana kaj Francisco Weschler, estas ankaŭ tre bone elpensita kaj tre utila por nia kompreno de la valoro de tiu materialo nun aperanta en Esperanto.

Adonis Saliba
(San-Paŭlo)

Ankaŭ mi tre ĝojis kunlabori – pere de unu plia briketo – por la estigo de tiu konstruaĵo [la eldono de la libro *Saluton, samideano!*]. Aloísio Sartorato estas tre valora homo, kompetenta, klera, serioza, ĝentila, idealisma kaj diligenta!

Mi deziras, ke tiu libro estu granda sukceso! Ĝia kovrilo estas belega! La enhavo estas riĉega! La kovril-klapoj estas perfektaj! La antaŭparolo, verkita de Givanildo, estas plena je beleco! Gratulon! Gratulon al Sartorato kaj al KKE! Tiu verko estu komerca sukceso!

Neide Barros Rêgo
(Niterói)

Redakcio de *InKo*
inko.kke@hotmail.com

Opinio

Fabiano Henrique

Pri la troa malfruo de *InKo*

Mi petas pardonon al niaj legantoj pro la malfrua apero de *InKo*. Ŝajnas, ke ĉi-kaze efektiviĝis tio, kion ni pritraktis lastanumere: la granda ŝarĝo sur la ŝultroj de unuj, dum la plejmulto nur spektas kaj postulas.

Tia situacio ja tre malutilas niajn gazeton kaj institucion. Kiam tio okazas, ĉia problemoj fariĝas des pli granda kaj trafas la tutan laboron.

Se ni havus pli da kunlaborantoj, estus pli facile trapasi la barojn. *Alea jacta est*: estas vi, kiu decidis, ĉu nia institucio kaj revuo progresos aŭ ne.

Variaĵoj pri la sama temo

Jam de kelkaj monatoj mi esprimis opinion pri la sinteno de homoj, kiuj kritikadas la redakcion de *Esperanto*, Fabrício Valle. Mi atentigu vin, ke li neniam petis de mi ian subtenon.

La situacio pensigas: “figuroj”, kiuj ankoraŭ ne prezentis pli bonajn kaj valorajn laborojn feroce lin atakas. Ĉio disvolviĝas antaŭ la okuloj de la estroj de UEA, kiu publike nenion faras, sed private plurmaniere pravigas la atakantojn.

Lastmonate Valle strange rifuzis ĉian subtenon, kvazaŭ sola li povus kontraŭbatali veran armeon. Kial? Koncernas min nur plenumi lian peton, eĉ dubante ĉu li sukcesos postvivi tiun bombardon. *Bonŝancon, amiko!*

Jurista prestigia congresso de esperanto

O ex-presidente do Supremo Tribunal Federal, Joaquim Barbosa, prestigiou o 99º Congresso Universal de Esperanto. O jurista encontrava-se em Buenos Aires na noite de 29 de julho, quando passou em frente ao teatro *Metropolitan Citi*, onde co-

meçava a programação musical do evento. Na oportunidade iriam apresentar-se a banda brasileira Supernova e o cantor italiano Manuël.

Barbosa foi convidado pelo secretário da Associação Universal de Esperanto (UEA), Clay Magalhães, e pelo ator Amarílio Carvalho.

Devido a outros compromissos, Joaquim Barbosa assistiu apenas à primeira parte do show. Simpático, ainda tirou fotografias com congressistas no saguão da casa de espetáculos. ★



Joaquim Barbosa com Eveline Paula e Amarílio Carvalho. (Foto: BEL)

Um método que estimula a criatividade

A Editora Baraúna, de São Paulo, publicou o livro *Komenca Esperanto - por baza kurso*. A obra é de autoria do professor carioca Azuil Vasconcellos. objetivo, o escritor estimula a criatividade dos instrutores, que - se necessário - deverão, por exemplo, cantar, saltar, gritar e mesmo gesticular.

Trata-se de um método elementar, cujas lições distinguem-se por ser faladas integralmente na Língua Internacional neutra, desde o começo. Para atingir o

Komenca Esperanto - por baza kurso tem 205 páginas. A obra pode ser diretamente encomendada ao editor, pela internet, bastando acessar o endereço torabarauna.com.br. ★



InKo Brasil

Cooperativa Cultural dos Esperantistas
Avenida Treze de maio,47 - sobreloja 208
Centro - Rio de Janeiro/RJ - (21) 2220-7486

Acesse a KKE na internet

www.kke.org.br



COMO DOMINAR, DE VEZ, O USO DE "ATA"/"ITA"

Descubra, por uma simples frase, se você é "artista" ou "itista"...

A FRASE "MÁGICA"

Para descobrir, facilmente, se você é um "artista" ou "itista", basta imaginar como você traduziria para o Esperanto uma frase tão simples como a seguinte: – "O clube foi fundado ontem"... A grande maioria, felizmente, opta pela forma tradicional, a qual, na realidade, era a usada pelo próprio Zamenhof, ou seja: "La klubo estis fondita hieraŭ"... Note-se que dissemos "fondita", ou seja, usamos o sufixo "ita". Se você optou por essa forma de tradução é porque você é um... "itista"... Mas, se você é dos que prefeririam dizer "La klubo estis fondata hieraŭ", então... você é um "artista", naturalmente... Acontece que, para os tradicionalistas (como o próprio Zamenhof), a frase "La klubo estis fondata hieraŭ" teria outro sentido, ou seja: "O clube estava sendo fundado ontem"... E, na prática, essa frase deveria, em geral, ser complementada com alguma outra oração, como, por ex.: "La klubo estis fondata hieraŭ, kiam mi alvenis" – O clube estava sendo fundado ontem, quando eu cheguei... Em resumo, no uso tradicional dos participios "ata" e "ita", usa-se "ata" para indicar uma ação incompleta; e usa-se "ita" para indicar uma ação completa...

POR QUE HAVERIA ESSA DIVERGÊNCIA?

Para quem é "itista" (como o próprio Zamenhof), a escolha do participio em "ita" revela apenas que, ao traduzir as formas "fondata" e "fondita", para uma língua como o nosso Português, basta estabelecer que a tradução do participio em "ata" inclui o nosso "sendo". Ex.: "fondata" = *sendo fundado*. Mas, em contrapartida, a tradução do participio em "ita" não inclui o uso do nosso "sendo", ou seja:

"fondita" = *fundado* – e não: "*sendo fundado*"... Mas note-se que nem todas as línguas dispõem de uma palavra como o nosso "sendo", o qual, como se sabe, é o gerúndio do verbo "ser". Aproveitemos para "refrescar" a memória com outros (óbvios) gerúndios do Português, como: *cantando, vendendo, partindo, tendo, havendo*, etc. Mas note-se agora que, curiosamente, há línguas que não têm uma forma equivalente ao nosso gerúndio. Esse é o caso (pelo que me informei em estudos esperantistas sobre "ata/ita") do Alemão (e outras línguas aparentadas com ele, como o Holandês). Felizmente, uma língua tão importante na atualidade, como o Inglês, dispõe do gerúndio – e também pode, facilmente, traduzir "fondata" por "being founded"; e "fondita" apenas por "founded". Mas, para os povos que não têm o equivalente ao nosso "sendo", basta indicar que a ação com "ata" é "incompleta"; e a ação com "ita" é completa. Tudo isso significa simplesmente que, para um "artista", uma frase como

"*La klubo estis fondata hieraŭ*" tanto pode equivaler à nossa frase "O clube foi fundado ontem", como também a: "O clube estava sendo fundado ontem"... Essa opção até pode ser considerada aceitável, pois as línguas podem aceitar diversas "convenções". O problema é que haveria, na prática, como que dois "dialetos" em Esperanto... E, se esse sistema "dissidente" fosse aceito, muitas obras literárias (inclusive a Bíblia) ficariam comprometidas... Mas, logo no início do Movimento, apareceu um "pioneiro" do sistema "artista". Era um alemão, chamado Meyer. Ele ensinou esse sistema "artista" num livro didático dele. Mas Zamenhof, numa crítica, não o aprovou – e disse: "Ne kiel

Meyer!", ou seja: "Não como Mayer"...

CONTRASTE FINAL DOS DOIS SISTEMAS

Vejamos, agora, apenas três frases para fixar bem a diferença entre os dois sistemas, ou seja: entre o tradicional ("itista") e o dissidente ("artista").

SISTEMA "ITISTA" (TRADICIONAL)

1) "La klubo estis fondita hieraŭ" – O clube foi fundado ontem.

2) "La klubo estis fondata hieraŭ, kiam mi alvenis" – O clube estava sendo fundado ontem, quando eu cheguei.

3) "La klubo jam estis fondita, kiam mi alvenis" – O clube já fora (tinha sido) fundado, quando eu cheguei.

Obs.– Note-se que, na terceira frase, o uso do advérbio "jam" (já) serviu para expressar o equivalente ao nosso chamado pretérito mais-que-perfeito.

SISTEMA "ARTISTA" (DISSIDENTE)

1) "La klubo estis fondata hieraŭ" – O clube foi fundado ontem; ou o *clube estava sendo fundado ontem*.

2) "La klubo estis fondita hieraŭ" – O *clube fora (tinha sido) fundado ontem*.

3) "La klubo jam estis fondita hieraŭ, kiam mi alvenis" O clube já fora (tinha sido) fundado ontem, quando eu cheguei.

CONCLUSÃO

O nosso objetivo maior era o de que você notasse a diferença básica entre os sistemas "artista" e "itista". Mas... esperamos que você é – e sempre foi – um bom "itista", sistema, aliás, oficialmente aprovado pela Academia de Esperanto, nos anos 60. Vamos encerrar com um toque bem-humorado, ou seja: – Esta é uma questão "delikata"... ou "delikita"?... ★

Obituário: Evaldo Pauli (1925-2014)

Foto: reprodução

Faleceu no dia 17 de agosto o professor Evaldo Pauli, de 89 anos. O passamento se deu em Florianópolis (SC).

Pauli destacou-se como um dos mais ativos pensadores esperantistas de todos os tempos. Alcançou renome internacional.

Em 1983 criou a *Filozofia Asocio Tutmonda*. No mesmo ano começou a publicar a revista *Simpozio*. Foi também membro da Academia de Ciências de San Marino (AIS) e da Associação Universal de Esperanto (UEA).

Evaldo Pauli foi padre católico entre os anos de 1950 e 1967. Era Doutor em Filosofia. Lecionou na Faculdade de Filosofia de Santa Catarina e realizou altos estudos da matéria no Brasil e no exterior.



Evaldo Pauli: grande filósofo esperantista.

Fundou a Academia Catarinense de Filosofia e integrou a Academia Brasileira de Filosofia.

O MUNDO DO ESPERANTO AO SEU ALCANCE

Torne-se sócio hoje mesmo!

Cooperativa Cultural dos Esperantistas



O Esperanto ganhou um presente e tanto!



Em seu mais novo livro, *Saluton, samideano!*, Aloísio Sartorato presenteia o público com o melhor de si. São textos leves e emocionantes, escritos com o conhecimento de quem vive intensamente o Esperanto há mais de meio século.



Um lançamento com a marca da Cooperativa Cultural dos Esperantistas

Pli kaj pli kreskas la intereso de brazilaj sportistoj pri la Internacia Lingvo



Foto: Evandro Caboco

Givanildo Costa prelegis pri Esperanto por ŝatantoj de *capoeira*

Esperanto kaj luktosportoj en Rio

Henriĥ

Inter la 8a kaj 10a de Aŭgusto okazis en la okcidenta regiono de Rio evento nomita *Angola d'agosto - Rio 2014*. Temas pri vera kongreso de *capoeira*, brazila sporto afrikdevena, kiu miksas dancon kaj lukton.

La programo konsistis el lecionoj, prezentaĵoj kaj kunfratiĝo inter majstroj kaj disĉiploj. Dekoj da homoj el la tuta lando alvenis.

Speciale invitita de la organizantoj, la radioparolisto Givanildo Costa (foto) faris prelegon pri Esperanto. ★

Futbalo por Esperanto en Afriko



Fotoj: F. Hounsounou

Amatoran futbala konkuradon oni estigis en Afriko por diskonigi Esperanton. ACM (Afrika Centro Mondcivitana) organizis tiusportan konkurson inter la 12a kaj la 16a de Julio, en la urbo

Lokossa (Benino). Ok infanaj teamoj partoprenis. Atletoj, teamestroj kaj spektantoj ricevis propagandfoliojn kaj kalendarojn pri la Internacia Lingvo. Antaŭ la fina matĉo okazis prelego pri tiu idiomo. La loka radiostacio

disaŭdigis interjuon kun la esperantisto François Hounsounou, la ĉefa organizanto de tiu evento. Ĝi estis realsendita la tri sekvajn tagojn. Tiun futbalan konkuradon oficiale subtenis la urba administracio.

Brazila senatano kunsidis Esperante kun direktoroj de Brazila Esperanto-Ligo

La nordorienta politikisto montris intereson pri la Internacia Lingvo

Santos de Miranda

La 28an de Aŭgusto la brazila senatano Paulo Davim akceptis membrojn de la estraro de Brazila Esperanto-Ligo (BEL). La interparolo okazis en Esperanto, lingvo kiun tiu politikisto bone posedas.

Partoprenis tiun aŭdiencon la direktoro pri Instituciaj Rilatoj de BEL, Afonso Camboim. Ankaŭ aliaj samideanoj ĉeestis.

Sinjoro Davim kaj lia sekretariino atente spektis prelegeton titolitan "Esperanto kaj la registaroj". Li montris intereson pri tiu temo kaj notis la ĉefajn informojn.

Fine la senatano deklaris, ke lia kabineto estas je la dispono de BEL por kunlabori koncerne la leĝo-projekton por meti Esperanton inter la lernobjektojn instruatajn en



Pedro Franga / Agência Senado

Paulo Davim akceptis la estrojn de BEL.

brazilaj lernejoj. Li eĉ deklaris, ke, post la nacia balotado, li provos aranĝi kunsidon kun la Ministro de Edukado. ★

Feliĉan kaj originalan Kristnaskon

Vi havos en la libroservo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. La plej varia stoko de libroj, KD-oj, DVD-oj, ĉemizoj kaj plurspecaj esperantaĵoj. Akceptu niajn sugestojn kaj surprizu viajn amikojn, familianojn kaj gastojn!

www.kke.org.br
esperanto.kke@gmail.com

Antaŭ io ajn, mi devas unue danki al Dio. Eĉ folio ne defalas de arbobranĉo se Lition ne permesas. En Julio mi ricevis egan donacon, por kiu li uzis samideaninon por roli kiel lia ilo por aŭspicii mian partoprenon en la ĵus pasinta IJK. Mi estas elkora Esperantisto; kaj ekde mia esperantiĝo mi estis revanta partopreni iun internacian kongreson. Dankon, Eternulo! Dankon, samideanino! Vi estas anĝelino!

Miaj ĉefaj impresoj pri Esperanto estas, unue, ke, parolante tiulingve kun homoj, ne gravas de kie ili venas. Ŝajnas, ke mi estas surstrate babilante kun miaj najbaroj. Kaj la dua impresoj, verŝajne dependa de la alia, estas tio, ke ĝi ebligas (almenaŭ al mi) la plej intiman kontakton. La angla lingvo estas ja utila. Mi ja lernas per ĝi, amuziĝas kaj tiel plu. Ankaŭ per la hispana mi tiaĵojn faras, sed ĉe Esperanto la afero estas multe pli intensa. Dum mia vizito al Ĉilio, mi gastis ĉe Esperantisto; kiam lundiaĝis li kompreneble devis labori. Li eksplikis ĉion al mi pri la utilaĵoj de sia hejmo, por ke mi estu scigita pri tio, kion fari kaze de malsato, malvarmo kaj cetere. Fine li diris: "Jen la kopio de mia ŝlosilo". Ĉu vi opinias, ke alia tipo de homo (normala, ne freneza Esperantisto) tiel konfidus je mi?! Nu, imagu, ke vi vizitas la

eksterlandon, kaj diras "Saluton, mi parolas la anglan". Maksimume oni respondus al vi: "gratulon". Nun, provu viziti Esperanto-klubon en la eksterlando, kaj poste rakontu al mi pri viaj atingoj.

Do, estis granda sperto mia vizito al Santiago de Ĉilio, kie mi tuŝis neĝon la unuan fojon. Sed des pli interesa estis la neoficiala IJK-antaŭkongreso, kiu okazis en Rio-de-Janeiro. Ĝi okazis, ĉar la eksterlandaj partoprenantoj de IJK ne estus kontentaj, se ili estus vizitintaj nian landon, kaj ne vizitintaj nian tiel konatan mirindan urbon. Do, homoj el Germanujo, Usono, Meksiko, Italujo, Francujo, Nederlando, Rusujo, Ukrainujo, Belgujo kaj kompreneble Brazilo, dum proksimume unu semajno kunamuziĝis tra nia urbo, kaj vizitis kelkajn vizitindaĵojn. Partoprenis en tiu aranĝo ĉirkaŭ 25 homoj. La nomo de la evento, *Karioka Renkontiĝo*, estas tia, ke ĝia mallongigo fariĝas *KoRo*, la organo de amo, laŭ iuj.

Mia unua partopreno en IJK, vizito al Ĉilio kaj Karioka Renkontiĝo

Leandro Silvestre

Dum IJK alia interesa afero, kiu mi konstatis, estis la altkvalitaj ligo-nivelo kaj programo. Krom amuziĝi, ekskursi kaj cetere, tre gravaj mi trovis la seriozajn TEJO-kunsidojn, kiuj tiuokaze estis malfermitaj al ĉiuj. Multaj homoj, ekzemple, kiuj volis helpi TEJO-n, sed ne sciis kiel, eble trovis respondon en tiuj kunsidoj.

Do, mi volas redoni al Esperanto ĉion, kion ĝi al mi donis, nome internaciajn geamikojn, senpagan gastigon en la 5 kontinentoj, lingvajn instruojn, rompon de antaŭjuĝoj, pli da fido je pli bona mondo, esperon. Pli kaj pli mi vidas, ke Esperanto estas pli mirinda ol eĉ ni esperantistoj mem imagas.

Nur Dio povas klarigi, kiel iu nura viro sukcesis krei tiom sukcesan projekton. ★



Esperanto Ilustrita lanĉis aplikan programon por portebaj aparatoj

Henriĥ

La virtuala revuo Esperanto Ilustrita lanĉis aplikan programon por portebaj aparatoj. La ceremonio okazis je la 12-a de Septembro, en la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en la urbocentro de Rio.

Nun la tuta enhavo de tiu retejo estas alirebla por uzantoj de poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj en la tuta mondo. Tiu programo estas disponebla por la ĉefaj operaciaj sistemoj, nome iOS, Android, Firefox OS kaj Windows Phone. Ĝi estis farita laŭ la modeloj estigitaj de la brazila firmo Fábrica de Aplicativos.

Laŭ la kreinto kaj redaktoro de Esperanto Ilustrita, la instruisto Fabiano Henrique, la celo de tiu projekto estas disponigi al la legantoj fingruman aliron al unu el la plej ampleksaj kaj ĝisdatitaj interretaj movadaj informiloj. Oni ankaŭ celas igi la publikon pli fidela, atingante pli junan aĝgrupon.

La programo enhavas duligvan materialon, en esperanto kaj en la portugala. La leganto tamen devas elekti la idiomon ĉe la komenca menuo. La ilustraĵoj ekzistantaj en la tradicia retejo ankaŭ aperas per tiu nova informadika rimedo. Krome oni povas komunikiĝi kun la redakcio.

La aplika programo de la revuo *Esperanto Ilustrita* estas senpage elŝutebla ĉe la jena adreso: www.app.vc/esperanto_ilustrita. ★



Starta paĝo por Android-aparatoj

Por uzantoj de Android

Antaŭ ol komenci la elŝuto-procedon, la uzantoj de la sistemo Android devas aliri la menuon *Sekureco* kaj tuŝi la eron *Nekontaj Fontoj*. Kvankam la programo ne estas disponebla ĉe *Google Play*, ĝia deveno estas fidebla. Je la fino de la muntado, estas rekomendeble restarigi la antaŭajn agordojn.

Nova programo por korekti tekstojn en Esperanto

Internacia Esperanto-Instituto (IEL) okazis kunvenon por instrui kiel munti kaj uzi novan informadikan tekstokorektilon. La aranĝo havis lokon en Hago (Nederlando), je la 11a de

Oktobero.

Tiu komputila programo nomiĝas ESPSOF. Ĝin elpensis la lingvokomputikisto Toom Wiktam. IEL finance subtenis la tutan projekton.

ESPSOF estas kodita en

VBA 6.0. Ĝi kongruas kun Windows 2000/XP/Vista/7 kaj kun Microsoft Office 2000/2003/2007, Word kaj Excel.

Beta-versioj estas senpage disponeblaj ĉe la jena retejo: www.espsf.com.

"Mi rekomendas al ĉiu esperantisto kiu bone deziras koni nian historion dum la lastaj 50 jaroj atentan tralegadon de Saluton, samideano!"

Saluton, Poeto!

Fernando Pita

Ĉiam estas tikla afero recenzi libron de ulo kiun ni konas kaj miras, ne nur pro liaj personaj sed ankaŭ pro liaj "esperantaj" kvalitoj. Tio pli komplikiĝas kiam temas pri elstara veterano de nia movado, ĉar, kio nova direndas pri Aloísio Sartorato? Kunfondinto de BEJO, veterano de BEL, instruisto kaj aŭtoro de instrumentodo tutlande konata, tradukisto, "honora historiisto", ja vera arĥeologo!, de nia movado, ktp; Sartorato estas unu el niaj – malferme, ĉiam pli raraj – "verdaj ikonoj".

Pro ĉiuj tiuj kialoj mi rekomendas al ĉiu esperantisto kiu bone deziras koni nian historion dum la lastaj 50 jaroj atentan tralegadon de *Saluton, samideano!*, libro kiu havas rolon nur kompareblan al la ismaela *Veterano?*: riĉega fonto por ke ni pli bone sciu pri ni mem.

Sed – kaj en tio ĉi la verko de Sartorato transpasas tiun de Ismael Gomes Braga – ĝi ne estas nur historia dokumentaro: ĝi ankaŭ enhavas la esperantajn versiojn de la portugallingvaj tekstoj kiujn li, dum tiom da jaroj, oferis al ni en multaj paĝoj de diversaj – ne nur lokaj, ne nur naciaj – revuoj.

Finfine, tiu elstara verko diskonigas por ni novan vizaĝon de sia aŭtoro, kaj, kvankam estas granda plezuro scii ke la ĉiam serioza Sartorato estas ankaŭ poeto, kaj bona poeto!, oni

devas plendi la malmultan kvanton de liaj propraj poemoj en la libro.

Tio estas la nura kritiko farinda al la verko: ĝi devus montri, de tiu nia veterana ĉionfaranto, iom pli pri lia sentema kaj lirika flanko, kaj tio ja mankas...

Do, Aloísio, verku pli da poemoj!!!

(La Esperanta komunumo plenkore antaŭdankas.) ★

Saluton, samideano!
Aŭtoro: Aloísio Sartorato
Eldonejo: KKE



Maëna Volant apartenis al la estraro de la franca esperanta junularo

La 24-jara franca esperantistino Maëna Volant mortis okaze de aviadila akcidento. Ŝi estis en la flugo AH5017, de la kompanio Air-Algerie.

La aerveturilo elflugis de Burkino al Alĝerio je la 24a de Julio. Kvindek minutojn poste perdiĝis la kontakto kun la pilotoj.

Partoj de tiu aviadilo estis trovitaj kelkajn tagojn poste en Malio, norda Afri-

ko. Ĉiuj 116 okupantoj forpasis.

Maëna Volant estis membro de la komitato de Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO). Ŝi estis en Burkino jam de dek monatoj farante volontulajn sociajn laborojn. Ŝi estis vojaĝanta al la urbo Caen (norda Francujo), por viziti familianojn.

Kondolencajn mesaĝojn oni sendis pere de sociaj retoj, kiel Facebook. ★

Franca esperantistino pereis en aviadila akcidento

Fotoj: reprod.



Maëna Volant

Wâner Marlière Arruda

La 25an de Aŭgusto mortis la brazila esperantisto Wâner Marlière Arruda. La forpaso okazis en hospitalo situanta en la urbo Ubã, en la Arbara Regiono de ŝtato Minas Gerais.

Arruda naskiĝis en la jaro 1955a. Profesie li laboris kiel publika oficisto. Krome li estis elstara spiritisto kaj framasono.

Dum jardekoj Wâner Arruda distingiĝis pro sia intensa esperantista agado. Li estis direktoro de la E-klubo João Ernesto kaj publikigis la informilon *La Verda Formiketo*.



Forpasis Andrzej Grzębowski



La 8an de Aŭgusto forpasis en Bonaero la pola esperantisto Andrzej Grzębowski, 71-jara.

Li fartis malbone en la hotelo, en kiu li restis okaze de la 99-a UK. Laŭ informoj diskonigitaj de Pola Retradio, li mortis de koratako.

Andrzej Grzębowski vivis en Bydgoszcz, centra regiono de Pollando.

Li fariĝis mondkonata pro sia turisma agado. Jam de kelkaj jaroj li estis direktoro de la firmo EsperantoTur.



Politika Esploro

Ŝvebas enigmo super la figuro de rusa prezidento, Vladimir Putin. Kial samtempe li estas forte subtenata interne, kaj ne tiom kaŝe malestimata internacie? La sveda ĵurnalisto Kalle Kniivilä iris en Rusujon esplori tiun temon kaj ekkoni la opinion de la loĝantoj de tiu lando.



Unu plia biografio pri Zamenhof

Walter Ŝelazny verkis en la pola biografion pri L.L. Zamenhof. Ne malŝaĝe la Esperanta versio estis adaptita por la koncerna publiko, fare de T. Chmielik. La libro *Ludoviko Lazaro Zamenhof: Lia pensaro, sekvoj kaj konsideroj* enhavas analizan rigardon al la vivo, verkaro kaj idearo de la kreinto de la Internacia Lingvo.



Ne nure prava omaĝo

Brazila Esperanto-Ligo eldonis la libron *Neforgeseblaj skribaĵoj de Ismael Gomes Braga*. El ĝi fontas leteroj, recenzoj kaj aliaj ĉiam modelaj tekstoj, verkitaj de unu el la plej gravaj brazilaj esperantistoj. Nemalhavebla por ĉiuj, kiuj ŝatas la figuron de IGB. La libro havas 263 paĝojn.

Esperantlingva literatura panoramo

Eldonejo Mondial, en Novjorko, publikigis la 20an kajeron de Beletra Almanako. Pere de ĝi la nuntempa Esperanta literaturo povas esprimiĝi kaj trovi eĥojn tra la mondo. Renomaj verkistoj kiel Jorge Camacho, Probal Dasgupta, Istvan Ertl, Tim Westover kaj aliaj elstaras.



Instruoj de Zamenhof

Sed tiuj Esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia koro, tiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan ideon; ili ne timos, ke la mondo moke nomas ilin utopiistoj, kaj la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj.

L.L. Zamenhof
Parolado efektivigita dum la 2a UK
Genevo (Svisujo), 1906.



La plej aŭskultata Esperanta radio-programo en la tuta mondo

Ne nur telefonalvokoj,
leteroj kaj retmesaĝoj
atestas nian sukceson.
La kvanto de niaj
aŭskultantoj estas
mezurata ĉiutrimonate
de IBOPE, la plej
grava opinio-esplora
institucio de Brazilo.
Averaĝe ni situas inter
la kvar plej aŭdataj
radio-programoj de la
metropola regiono de
Rio-de-Janeiro.
Esperanto dankas.



Programo

Esperanto, la Lingvo de Frateco

Marde: 15h00

Vendrede: 23h00

Radio Rio de Janeiro AM 1400 kHz

www.radioriodejaneiro.am.br

linguadafraternidade@bol.com.br

